# Decido

Ursula Nafula
Vusi Malindi
dohliam
2
Esperanto eo

Mia vilaĝo havis multajn problemojn. Ni viciĝis longe por akiri akvon de unu krano.

Ni atendis manĝaĵon donacitan de aliuloj.

Ni ŝlosis frue la domojn pro ŝtelistoj.

Multaj infanoj forlasis la lernejon.

Junaj knabinoj laboris kiel servistinoj en aliaj vilaĝoj.

Junaj knaboj vagis tra la vilaĝo, dum aliuloj laboris en la bienoj de homoj.

Kiam la vento blovis, forĵetitaj paperpecoj pendiĝis sur la arboj kaj la bariloj.

Homoj trancis sin per rompitaj vitropecoj, kiujn aliuloj ĵetis senatente.

Tiam, unu tagon, la krano sekiĝis kaj niaj akvujoj malpleniĝis.

Mia patro marŝis de unu domo al alia kaj petis homojn ĉeesti vilaĝan kunvenon.

Homoj kunvenis sub granda arbo kaj aŭskultis.

Mia patro ekstaris kaj diris, “Ni devas kunlabori por solvi niajn problemojn.”

Okjara Juma, kiu sidis sur trunko de arbo, ekkriis, “Mi povas helpi purigi.”

Unu virino diris, “La virinoj povas aliĝi kun mi por kreskigi manĝaĵon.”

Alia viro stariĝis kaj diris, “La viroj fosos puton.”

Ni ĉiuj ekkriis unuvoĉe, “Ni devas ŝanĝi niajn vivojn.” Ekde tiam, ni kunlaboris por solvi niajn problemojn.

# Global Storybooks

globalstorybooks.net

## Decido

Ursula Nafula
Vusi Malindi
dohliam

CC BY